
FN PER ANC 47

**N°256** **DECEMBRO 2013**

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO

# ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 résidence les Terres Quemines 76113 Hautot-sur-Seine.
Tel. 02 35 34 28 78 LEMARCHANDPI@wanadoo.fr
Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.
La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la enhavo de la artikoloj kaj opinioj de la unuopaj aŭtoroj.






**22a de JUNIO 2013a**

**64a Ĝenerala Kunveno. Bricquebec. Desegno de nia amiko HORI Jasuo.**

99a Kongreso de **Universala Esperanto Asocio** en **BONAERO Argentino** de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 2014.




**SAT - KONGRESO** :
7a - 16a de Aŭgusto 2014.
en DINAN. Francio.
**SAT-AMIKARA**
Jar-kunsido :
9a de Aŭgusto. DINAN

**ESPERANTO-FRANCE** : Landa kongreso en **CHAMBÉRY** de 30a de majo ĝis 1a de junio 2014.

## *En tiu numero :*


| | |
|---|---|
| Fustibalo. | 2 - 3 |
| Kongresu ! | 3 |
| Ili estas belaj... | 4 |
| Mundolingua. Paris. Granville. Coutances | 5 |
| Abonoj, kotizoj | 6 |

# *La ...fustibalo.*

De longega tempo la prahistoriaj homoj havis la ideon damaĝi atakantojn, ĉu bestoj aŭ homojn, de kiel eble plej malproksime, por eviti aŭ prokrasti la momenton de korpa batalo. Tial, inventemaj uloj konceptis la lanĉadon al siaj malbonvolantoj de ŝtonoj kaj lignopecoj. Laŭ la jarmiloj, ili plibonigis tiujn bazajn ideojn per frondo *(1)*, sago, ĵetlanco, kaj aliaj ridindaj mortigiloj atende de kugloj, obusoj kaj bomboj pri kiuj, trankviliĝu, mi tute ne intencas tie trakti. Fakte, mi volas hodiaŭ paroli nur pri grava etapo pri perinstrumenta ŝtonĵetado.


Ĉiu konas la fondon, uzita de David por mortigi Goljaton, sed la fustibalo estas malpli konata.


La latina verkisto Flavius Vegetius ĉirkaŭ la jaro + 390, skribis libron titolitan « *De re militari* » (*De la chose militaire* - Pri militistaj aferoj). En tiu tre fama libro li priskribas la organizon, la metodojn kaj la armilaron de la romiaj armeoj, kiuj eksplikas la plejoftan superecon de tiuj armeoj. Inter la priskribitaj armiloj troviĝas iun ŝtonĵetilon, la fustibalon.

Fustibalo estas frondo kuplita kun bastono, la fusto. La latina vorto « *fustibalus* » estas kunmetaĵo de la latina vorto « *fustis* » = fusto, kaj de la greka « *ballein* » kiu signifas lanĉi. Oni retrovas tiun radikon en la vortoj balisto, balistiko, arbalestro, balono, parabolo, bolido, simbolo, kaj, malpli evidente en multaj aliaj vortoj. Nur pro plezuro, kiun mi esperas ankaŭ miaj legontoj spertos, mi iomete daŭrigos tiun etimologian terminologion aldonante unu el la esperantaj vortoj kiuj entenas la radikon « *ballein* = lanĉi ». Tem-as pri la vorto « paroli ». La derivado estas jena : anstataŭ ol uzi la klasikan latinan vorton « *loqui* = paroli » (pensu pri « elokventa », *soliloque, ventriloque*, ...), la romiaj soldatoj pli volonte uzis la slangan vorton « *parabolare* ». Tiu vorto reale signifis « paroli per paraboloj », prelegaĉi; el ĝi la gaŭloj, kiuj ĝin kredis korekta, faris la francan vorton « *parole* ».

Sed mi revenu al mia fustibalo.


Temas pri simplega objekto de kiu jen krokizo :





Jen tri tipaj fazoj de ŝtonlanĉado per ĝi :







**Fazo 1** : La fustibalisto preta lanĉi dumane tenas la fuston.

**Fazo 2** : Li rapidege levas la fuston, iomete kiel fiŝkaptisto levas sian fiŝkanon por forlanĉi la fadenon kaj la hokon.

**Fazo 3** : Kiam la ŝnuroj de la frondo pasas je vertikalo super la kapo de la lanĉanto, la buklo **F** de

la ŝnuro E liberiĝas de la kroĉileto B. Tio liberigas la ŝtonon el la poŝo. La momento de tiu liberigo estas decidiga : se ĝi okazas tro frue la ŝtono forflugas proksime de la vertikalo kaj ne tre malproksimen falos. Se ĝi okazas tro malfrue, la ŝtono falas je kelkaj metroj de la piedoj de la lanĉisto.

La momento je kiu la ŝnurbukleto liberiĝas de la kroĉileto dependas de la kurbiĝo de tiu kroĉileto. Oni facile atingas la optimuman formon post diversaj provoj kaj modifetoj.

Oni povas trovi multajn detalojn kaj videaĵojn pri fustibalo per interreto. Mi fabrikis unu, kaj juna bonepo mia, ĵus post malkovro de la aparato, sukcesis lanĉi ducentgraman ŝtonon je 60 metroj post sia deka pafo. Laŭdire, la specialistoj de la romiaj armeoj atingis 300 metrojn kaj la pafaĵoj povis pezi ĝis 700 gramoj. Sed laŭ intereto, la nunaj ĉampionoj atingas nur la duonon de tiu distanco.

(1) *Fronde :* Grand Dictionnaire Français E° ne kontentige tradukas la francan vorton « *Fronde* » per « ŝtonĵetilo » kaj « ĵetrimeno ».

- **Ŝtonĵetilo** : estas tro ĝenerala; ĝi estas specara *(= générique)* vorto kiu inkluzivzas plurajn specojn da objektoj de sama celo : ĵetado de ŝtonoj (frondo, sustibalo, katapulto, *pierrier, ...)*
- **Ĵetrimeno** : ankoraŭ pli malbonas ĉar frondo ne estas rimeno, kaj ne nur konsistas el rimeno, sed ankaŭ el poŝeto.

En Plena Ilustrita Vortaro, la vorto « Frondo » troviĝas (kun majusklo), sed ĝia signifo estas limigita je la grava historia ribelo kiu okazis en Francio dum la neplenaĝeco de la reĝo Ludoviko XIV-a : tiu ribelo ricevis tiun nomon pro la ofta uzado dum ĝi de tiu armilo.

**Henri ROUSSEAU**

---

## ***KONGRESU !***

### *EŬROPO :*

**27 décembre-3 janvier** - ***Allemagne.***
12e Rencontre de fin d'année, à Sarrebruck.
http://www.esperantoland.org/de/

**27 décembre-3 janvier** - ***Allemagne.***
30e Festival international de fin d'année, à Nördlingen.
http://www.internacia-festivalo.de/

**28 décembre-2 janvier** - ***Allemagne.***
4e SANO, rencontre de fin d'année, à Herzberg.
http://esperanto-urbo.de/page.php? pid=91295910

**28 décembre-4 janvier** - ***Pologne.***
5e JES, semaine de la Jeunesse Espérantophone, à Szczawno Zdrój.
http://jes.pej.pl/

**8-9 mars** - ***Finlande.***
Journées d'hiver avec conférences, excursions, à Turku.
http://www.esperanto.fi/Eventoj/

**16-22 avril** - ***Italie.***
IJF 2014, festival international de la jeunesse, à Castelsardo.
http://iej.esperanto.it/ijf/?lang=eo

### *EKSTER EŬROPO :*

**28 décembre-4 janvier** - ***Bénin.***
5e Congrès africain d'espéranto, riche programme, à Cotonou.
http://uea.org/vikio

**31 décembre-1er janvier** - ***Chine.***
Rencontre du Nouvel An pour la paix dans le monde, au monastère.
Tiefo. chielismo(chez)hotmail.com

**2-5 janvier** - ***Brésil.***
5e NOVA, rencontre de fin d'année, à Petropolis.
http://novjaraarangxo.wordpress.com/

**15-21 janvier** - ***Nouvelle-Zélande.***
Congrès néo-zélandais d'espéranto à Auckland.
info(chez)esperanto.org.nz

**17-20 janvier** - ***Corée.***
9e Rencontre internationale de méditation à Iksan.
esperanto(chez)saluton.net

**24-26 janvier** - ***Nicaragua.***
1er Congrès international d'espéranto à Granada.
kongreso2014(chez)esperanto-nicaragua.org

**24-28 janvier** - ***Brésil.***
49e Congrès brésilien d'espéranto, à Florianopolis.
http://esperanto.org.br/bel/

**25 février-1er mars** - ***Pakistan.***
2e Séminaire d'Asie du Sud, à Lahore.
tariqumarch(chez)hotmail.com

**6-17 mars** - ***Népal.***
Excursion spéciale 2014, à Katmandou.
http://www.esperanto.org.np/

**12-16 mars** - ***Cuba.***
Rencontre d'espéranto dans un cadre environnemental exceptionnel, à Viñales, Pinar del Río.
info(chez)esperanto.co.cu

**5-10 avril** - ***Géorgie.***
7e Rencontre moyenorientale à Tbilissi.
http://uea.org/vikio/La_sepa_Mezorienta_Kunveno_en_Kartvelujo_en_2014

**18-25 juillet** - ***Brésil.***
70e IJK, congrès international de la jeunesse, à Fortaleza.
http://ijk.brazilo.net/

## ELLES SONT BELLES .

## ILI ESTAS BELAJ ?

## THEY ARE BEAUTIFUL ?

Dum ĉirkaù unu jaro, mi letere interŝanĝis ideojn kun normanda samideano pri lingva problemeto kiun li estis al mi submetinta : Li bedaŭris ke esperanto ne kapablu esprimi la sekson, aù la senseksecon, de pluraj estaĵoj, kiam ilia nomo estas anstataŭita de persona pronomo. Tiel, frazo kiel "Elles sont belles", tradukiĝas per "Ili estas belaj" kiu povas ankaù signifi "Ils sont beaux". Mi samopiniis de longe.

Kial esperanto devus imiti la anglan en tiu kazo de malriĉeco, de malkapablo esprimi nuancon ? (Ĝi diras : "They are beautiful", frazo en kiu oni ne scias ĉu temas pri viroj, virinoj, senseksuloj, aù miksaĵo de tiuj). Tamen, sen herezia kreaĵo, sen tuŝeti la prave netuŝendan Fundamenton, esperanto, per siaj jam ekzistantaj kapabloj, facile povus solvi la priskribitan demandon. Mi konsentas pri la fakto ke tre ĝenerale la kunteksto ebligas nuligi la dubojn, sed ne ĉiam tiel kazas ; krome, ke oni sukcesu elcerbumi paliativojn, ne estas sufiĉa pravigo por plenvola restado en malkapablo esprimi nuancon kiam eblas alimaniere fari.

Kiuj do estas tiurilate, la eblecoj de esperanto al kiuj mi ĉi supre referencas ?

1°) Oni povas konsideri ke eble nekonscie, Zamenhof mem enkondukis pluraligan prefikson "i" por la vira persona pronomo "li", prefikso kiu kondukas al "ili" (anstataù la regula "lij").

Oni do povus ankaù uzi tiun prefikson por "ŝi" kaj por "ĝi", kaj tiel obteni "iŝi" (elles) kaj "iĝi" (ils ou elles neutres) ; el tiuj pronomoj oni povus formi la diversajn derivaĵojn, "iŝia", "iŝian", "iŝiaj", "iŝiajn", "iĝia", ... ktp ...

Apoge al tiu ekuzado, **ni sciu ke la "Plena Analiza Gramatiko de Esperanto" de Kalocsay kaj Waringhien, proponis en sia paĝo 73, ke oni uzu la pluralan formon "iŝi"** por inseksuloj kiam estas necese ; bedaŭrinde la praktiko ĝis nun ne sekvis tiun proponon, nesufiĉe konatan.

2°) Se temus pri aro da viroj kaj virinoj, oni jam povas formi la tute konforman pronomon "geili" kaj derivaĵojn "geiliaj" ... Se la grupo entenus ankaù senseksulojn, oni povus reveni al "ili".

Neniel temus pri revolucia atenco kontraù esperanto, inda je anatemo fare de puristoj, sed nur pri iom post ioma enkonduko en la praktikon de relative malofte necesa precizigo, kiu utiligus jam ekzistantajn eblecojn de la lingvo. Mi ŝatus koni la opinion de la legontoj pri la temo.

**Henri ROUSSEAU**

46 Parc Viking 14 920 - Mathieu.

***Maison Culturelle de l'Espéranto***
***CHATEAU de GRESILLON***
***St Martin d'Arcé***
***49150 Baugé-en-Anjou***
Tel. : 02 41 89 10 34
www.gresillon.org

**Programo 2014a :**

**28 decembro - 2 januaro** : Jarfina **FESTego** kaj Silvestra (Novjara) FESTeno laŭ franca maniero kun maskobalo.
**19 ĝis 26 aprilo** : **Fringoj** (Festa Renkonto INternacia de GeknabOJ) por infanoj kaj grupoj de lernantoj, kunlabore kun Elisabeth Barbay.
**26 aprilo - 4 majo** : **PRINTEMPas** - intensivaj kursoj kun Radojica Petrović kaj Christophe Charazein kaj internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1).

Maison Culturelle de l'Esperanto




**Espace unique en Europe**, Mundolingua est un véritable « espace de découvertes » **ouvert à tous**, qui révèlera **de façon ludique,** au grand public**, les secrets des linguistes et les clefs du langage.**

Naturellement situé **au coeur du quartier latin** : entre le Jardin du Luxembourg et Saint Sulpice, Mundolingua propose une **visite agréable, intimiste et originale, sur près de 170m²**.

L'exposition permanente est divisée en **3 espaces/ continents centraux : Langue, Langage et Nouvelles Technologies/Linguistique** qui permettent aux visiteurs de décortiquer chacun des sujets, grâce à de **nombreuses alcôves thématiques. Un microcinéma, un espace de jeux et de détente, ainsi qu'une boutique** bien achalandée (en articles de calligraphie, décodages, jeux...) complètent la visite et accentue son caractère éducatif et accessible à tous.

Parmi les trésors de Mundolingua, les visiteurs découvrirons une **réplique de la Pierre de Rosette**, une **reproduction d'un des fameux Rouleau de la Mer Morte**, ainsi qu'**une authentique machine Enigma.**


**ASSOCIATION MUNDOLINGUA**
*10 rue Servandoni – 75006 Paris*
*tél. +33 (0)1 56 81 65 79*
*Ouvert tous les jours de 10h – 19h*
*Métro : St Sulpice, Odéon, Sèvres Babylone.*
*contact@mundolingua.org*
http://www.mundolingua.org




***GRANVILLE :*** Nia amiko **Christian Levesque** gvidas kursojn en la Interaĝa Universitato ĉiujn ĵaŭdojn de la 10a ĝis la 12a h. Por la komencantoj la kurslibro estas « Gerda malaperis », por la pratikantoj, ĝi estas : « Paŝoj al plena posedo ».

***COUTANCES :*** Christian gvidas ankaŭ babilrondon monatan ĉe « Unelles », last-ĵaŭde, per la bild-libro : « Tinĉjo, la templo de l' suno ».

**Kvinpetalo** en Bouresse (proksime de Poitiers) proponas staĝojn de diversaj niveloj, i.a. por **pretigi al la ekzamenoj de FEI kaj trejni homojn por la UK 2015** (ĉiĉeronoj i.a.).



- 17a -21a de februaro: **februara staĝo**, pluraj niveloj (komencantoj, komencintoj, progresintoj). Gvidanto : **Ansofi Markov**. Ebleco je ekzamenoj de FEI sabate la 22an de februaro.
- 14a - 18a de aprilo : staĝo por **trejnado de instruistoj**, kun **Katalin Kováts**, (semajno antaŭ Pasko). Taŭgas por specialiĝo Pedagogio.
- 23a - 27a de aprilo: **staĝo pri literaturo**, kun **Anne Jausions**.

Studado de la libroj de la programo por preparo al atesto pri supera lernado :
*La Fotoalbumo*, de Trevor Steele, 1a volumo.
*Ĉu vi konas Blaise Cendrars?* de Manuel de Seabra.
*Ne ekzistas verdaj steloj*, de Liven Dek.
*Kredu min, sinjorino!* de Cezaro Rossetti.

- 20a -24a de majo: staĝo por **lernado de la lingvo**, pluraj niveloj kun kuba esperantisto Miguel Angel Gonzales.

**Planataj, sed datoj ankoraŭ ne definitivaj**:
- staĝo pri **tradukado**, kun Brian Moon. (taŭgas ankaŭ por preparo al atesto pri supera lernado).
- staĝo por **lerni ĉiĉeronadon**, kun Catherine Kremer (specialiĝo).
- **turisma** semajno, kun Catherine Kremer.
- **botanika** semajno (tio ankaŭ taŭgas por la specialiĝo scienco).

Ni ĝenerale havas altnivelajn fakulojn por gvidi tiujn staĝojn, rekonataj en siaj fakoj ekster nia esperanto-mondeto.

**KVINPETALO** Esperanto-Centro
**Akceptejo kaj poŝta adreso:**
4 rue du Bureau FR-86410 BOURESSE
**Retadreso** : informoj@kvinpetalo.org
**Telefono** : (+) 33 (0) 549 034 314 aŭ se ne respondas: (+) 33 (0) 6 07 31 67 81
**Retpaĝaro** : http://kvinpetalo.org/

# ESPERANTO - NORMANDIE

*Une ouverture sur tous les peuples, toutes les cultures*

## Kotizo por 2014

Faru vian ĉekon profite de:

ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN

Abon-kotizo por 2014 : 8 Eŭroj,

kaj sendu ĝin al la kasisto :

Pierre Lemarchand,

2 Résidence Les Terres Quemines

76113 Hautot-sur-Seine.

## Kotizoj - Abonoj por 2014 :

***Membroj de SAT : ATENTU !*** : Nia amiko Petro QUILLAUD sukcesis trovi anstataŭanton por zorgi pri la kotizoj al Sennacieca Asocio Tutmonda de la franc-lingvanoj. Do ek de nun, sendu viajn kotizojn, abonojn por « Sennaciulo » kaj SAT al :

**MAURRAU Barthélémy, appartement 120, 3 allée Nathalie Sarraute, 27000 Evreux.**

**CCP : Sat-Peranto : 17.333.10.N. Paris.**







**SAT-AMIKARO :** 132/134 Boulevard Vincent Auriol 75013 Paris. Tel. : 01.44.24.50.48.
www.sat-amikaro.org
CCP. : 37.852.90.L 033 La Source.
Cotisation + abonnement à « La Sago » : 35,00 €
Abonnement simple «La Sago» sans adhésion 32,00 €

**SAT :** Sennacieca Asocio Tutmonda : 67 avenue Gambetta. 75020 Paris. Tel. : 01.47.97.71.90.
www.satesperanto.org
Cotisation à SAT + abonnement à « Sennaciulo » (11 n°s) : 52,00 €
Maurrau Barthélémy, appartement 120, 3 allée Nathalie Sarraute, 27000 Evreux.
CCP. : SAT-PERANTO : 17.333.10.N. Paris.

**Esperanto France** 4 bis rue de la Cerisaie 75014 Paris Tel. : 01.42.786.886. www.esperanto-france.org
Cotisation : (chômeurs : 15 € ) 39,00 €
Abonnement au « Monde de l'Esperanto » : 18,00 €

- *Universala Esperanto Asocio :*

Cotisation : (avec Jarlibro) 26,00 €
Cotisation, tarif réduit : (sans Jarlibro) 11,00 €
Cotisation avec abonnement à la revue « Esperanto » : 63,00 €

- *Esperanto-Jeunes :*

Cotisation « Espéranto-Jeunes » +« Espéranto-France » : 30,00 €
d° - pour étudiants, chômeurs : 15,00 €

- *TEJO : (Association mondiale des Jeunes) :*

Cotisation + abonnement à « Kontakto » : 26,00 €
- d° - + abonnement à la revue « Esperanto » 63,00 €

**Esperanto-INFO :** Les Bories de Coperlac. Mas de Saint Chély. 48210 Sainte Enimie.
Tel. : 04.66.48.58.48
CCP. : n°11.901.46.B 029 Marseille.
Abonnement + Adhésion: (6 n°s) : 20,00 €

## Alvoko al ĉiuj Normandaj grupoj :

(Le Havre, Flers, Coutances, Cherbourg, Hérouville, Granville regiono ....)

Ne forgesu sendi al nia bultena adreso (vidu front-paĝe la adreson de la prizorganto), ĉiujn praktikajn informojn (adreso, datoj, horoj, niveloj, kursgvidanto, nombro da gepartoprenantoj...). Ni nepre publikigos tiujn informojn en la venontaj bultenoj; same kiel fot-ojn de viaj grupoj. Bonvolu ankaŭ sendi al ni la adres-ojn (poŝtan kaj retan) por ke viaj novaj gelernantoj ricevu senpage dum la nuna lernjaro nian modestan bultenon. Antaŭdankon pro la informoj !

***AGRABLAJN FESTO-TAGOJN ! por ĉiuj !***



*Un grand merci à toutes celles et ceux qui, lors du renouvellement de leur cotisation-abonnement, ajoutent un don pour notre association et nous envoient un petit mot de soutien. Bien amicalement, Pierre Lemarchand*